

# ***Kluba Bulteno***

Organo de Klubo Esperantista en Oslo

**N-ro 2 2019**

**Dimanĉon la 31an de marto**

**67a jaro**

## **Kalendaro**

Ĉiuj vesperaj kunvenoj komenciĝos je la **18a 30.**

### **Mardon la 2an de aprilo** (semajno 14) *tirsdag*

Loĝejon ĉu aĉeti aŭ lui? Diskuto. Ĉu ŝpari kaj prunti dum duona vivo por povi aĉeti – aŭ financi gepatroj, aŭ ĉu forspezi monon per luado?

*Skal man kjøpe bolig eller leie? Diskusjon. Skal man spare og låne halve livet for å kunne kjøpe, eller skal foreldrene bidra – eller skal man bare leie, og således bruke opp pengene?*

Nian klubejon/ oficejon/ stokejon "Esperantonia" ni siatempe aĉetis: Ĉu saĝe?

*Vårt møterom/ kontor/ lager "Esperantonia" kjøpte vi i sin tid. Var det lurt?*

### **Lundon la 15an de aprilo** (semajno 16) *mandag*

Venezuelo: la situacio nun.  
Enkondukos Alexander Harestad.

*Venezuela: situasjonen nå. Innledning ved Alexander Harestad.*

### **Mardon la 7an de majo** (semajno 19) *tirsdag*

La klimata minaco. Diskuto.  
Enkondukos Harald Rygg.

*Klimatrusselen. Diskuto.  
Innledning ved Harald Rygg*

### **Lundon la 20an de majo** (semajno 21) *mandag*

Temoj kiujn traktos la landa kongreso.

*Temaer som skal behandles på landsmøtet.*

### **Mardon la 4an de junio** (semajno 23) *tirsdag*

Raportoj el la landa kongreso.

*Rapporter fra landsmøtet.*

### **Lundon la 17an de junio** (semajno 25) *mandag*

Someraj E-aranĝoj en eksterlando, i.a. Baltiaj Esperanto-Tagoj en Litovio.

*Sommermøter i utlandet, bl.a. Baltiske Esperantodager i Litauen.*

# OKAZIS

## Lundon la 21an de januaro

Ĉu doni monon al almozetantoj surstrate? Ĉu ni, kiuj havas abundon, rajtas rifuzi helpon al mizeruloj? Tamen kiel certigi ke la donaco atingas bezonantojn, se la petantoj ne parolas Esperanton? Kaj ĉu iel limigi la ricevaron? Ankaŭ Esperanto-aktivuloj, ekz-e en Afriko, petas monon (retpoŝte). Sed pri tio estas pli facile: Esperanto vivas multe pli forte diversloke en Afriko ol nuntempe en Norvegio.

## Mardon la 5an de februaro

Ni traktis malfacilan ĉapitron en la kajero *Malnovaj metioj*, helpe de kvin vortaroj kaj unu E-akademiano.

## Lundon la 18an de februaro

Kun du novuloj ni longe inter-

parolis – en Esperanto – pri niaj kaj iliaj personaj spertoj pri ek- kaj plulernado de la lingvo. Kiel ni konvinku aliulojn pri ties lernindeco? Ni ankaŭ diskutis kiajn servojn povas oferti la klubo, nun kiam ĉio – ankaŭ internacia kontakto – funkcias per la reto.

## Lundon la 18an de marto

Kial oni subvencias aviadilojn kaj busojn, sed ne trajnojn, kvankam ili estas la plej bona transportilo el media vidpunkto? demandis Kjell Peder, kaj ni interŝanĝis spertojn pri maloftaj, maltaŭgaj kaj malfacile mendeblaj trajnoj, ankaŭ en Centra Eŭropo. Sed fidon pri la estonteco de la trajnoj havas la ĉinoj, kiuj plenforte konstruas fervojojn en orienta Afriko kaj de Ĉinio al Eŭropo.

---

## Kromekzempleroj

En la klubejo ni havas grandan kolekton da kromekzempleroj de internaciaj periodaĵoj el la lastaj jaroj: *Heroldo*, *Sennaciulo*, *Literatura Foiro*, *Kontakto* k.a. Ankaŭ multaj pli malnovaj. Venu kaj prenu!

---

## Ĉu iu volas lui kunvenĉambron? – *leie møterom?*

Nia kunvenejo estas ofte neuzata, sed taŭgus por kunvenoj de malgrandaj grupoj aŭ – post rearanĝo de la mebloj – ĝis ĉ 20 homoj. Ekz-e por loka sekcio de tutlanda organizo. Alloga povas esti la rekta eniro el la strato. Ĉu vi konas iujn kiuj bezonas kunvenejon?

*Kjenner du noen som kunne være interessert i å leie møterommet vårt for én eller flere kvelder? Eller en helg? Vi trenger leieinntekter! Brosjyre med nærmere opplysninger og bilder.*

# La jarkunveno / Årsmøtet, mardon 5. marto

En la kluba jarkunveno ni faris multajn etajn redaktajn plibonigojn en la jarraporto, kaj aldonis sub A. Ekstera agado mencion de la informkunvenoj por Duoling-anoj:

Tri fojojn ni invitis lernantojn pri Esperanto ĉe la anglalingva retkurso Duolingo al informkunvenoj, kaj unu fojon la junularo invitis ilin al neformala kunveno en kafejo. Al la unua kunveno, fine de aŭgusto, venis du Duoling-anoj kaj unu plia novulo. Al la aliaj kunvenoj venis neniu.

La jarkalkulon ni aprobis senŝanĝe.

La definitivan version de la jarraporto ni pretas sendi al petantoj.

## Elektioj

Ni reelektis la jenajn:

prezidanto: Kjell Peder Hoff

sekretario: Douglas Draper

kasisto: Harald Rygg

kaj kiel estraranon ni elektis Alexander Harestad Kvidbergskår.

Anstataŭantoj/varamedlemmer: Ni reelektis Ellen Dalen kaj Jacob Grevstad (kvankam ĉi-lastata studas en Trondheim).

Revizoro: Terje Meier (reelekto kondiĉe ke li akceptos). Anstataŭanto mankas.

Kluba reprezentanto en la domkomisiono: Ni reelektis Kjell Peder Hoff. Kiel anstataŭanton ni elektis Harald Rygg.

Elekta komisiono: ne elektita.

---

## Info-budoj en foiroj?

**Se vi scias / aŭdos** pri ia foiro, kunveno, konferenco aŭ festivalo, kie eblus starigi informbudon (senpage aŭ malmultekoste), **bv. sciigi tion al ni.**

**Viktig:** *Si fra om du vet om en messe eller festival e.l. hvor vi kan få satt opp en info-bod eller en liten utstilling. Folk vet ikke at Esperanto finnes!*

---

Klubo Esperantista en Oslo, Olaf Schous vei 18\*, 0572 Oslo. Tlf. 22 35 08 94  
Tramo 17 al Sinsenterrassen aŭ buso 31 al Rosenhoff aŭ metroo 5 aŭ 4 al Sinsen.  
Vd. pli detale interrete ĉe [esperanto.no/oslo](http://esperanto.no/oslo) => "vojklarigo".

\* inng. Schouterrassen. [www.esperanto.no/oslo](http://www.esperanto.no/oslo) Retpoŝto: [oficejo\[a\]esperanto.no](mailto:oficejo[a]esperanto.no)  
Bankkonto 0532 36 19699 (sed kotizon pagu al NEL/*Forbundet* 0533 05 22870).

Ĉi tiun *Bultenon* prizorgis Douglas Draper